

Librejo HACHETTE & K^o, PARIS, kaj ĝiaj KORESPONDANTOJ :

JUS APERIS :

1909

Tutmonda Jarlibro

ESPERANTISTA

KUN LA

Adresaro de D^{ro} ZAMENHOF

KAJ LA

Esperantista Societaro

de Esperantista Centra Oficejo.

Tiu ĉi jarlibro aperis dum la Kongreso. Ĝi entenas : plej novajn sciigojn pri la propagandaj societoj, la konsulejoj, la gazetoj en Esperanto ; adresojn de Esperantistoj de l'tuta mondo dezirantaj korespondadi ; adresojn de la komercistoj, kiuj uzadas Esperanton, k. t. p.

Unu volumo in-16, 254-paĝa (*broŝurita*) Fr. 2 50

La Eldono 1910, en preparo, enhavos :

1^e — La **SOCIETARON** de Centra Oficejo, entenanta la **liston** de la **Esperantistaj societoj, grupoj**, kun la adreso de la komitatanoj, de la **Konsuloj-Agentoj Esperantistaj**.

2^e — La **liston** de la **Esperantistoj** skribantaj bone en Esperanto, kaj dezirantaj korespondadi.

3^e — La **liston** de la **Firmoj, Hoteloj, Restoracioj**, k. t. p., kiuj uzas Esperanton.

4^e — La **grandajn reklamojn** de la **firmoj**, k. t. p.

Peti la specialan tarifon ĉe la Administracio de T. J.

AVIZO. — Por **enskrubiĝo** en la **estontaj eldonoj**, sin turni al la Administracio de T. J. aŭ al la Centra Oficejo, **antaŭ la 31 de Decembro.**

En la **Societaro** la enskrubiĝo estas senpaga. Por propaganda celo, ĉiu nova societo, ĉiu nova grupo, ĉiu nova konsulo estas varme petata, ke ĝi konigu sin al « Centra Oficejo », 51, rue de Clichy, Paris, kaj konigu poste, ĉiun ajn saĝon.

En la **Korespondado** kaj en la **Esperantista Komercistaro**, simpla enskrubo estas senpaga. Ĉiu aldonu, ĉu por precizigi la temon aŭ la rimedon elektitan, ĉu por precizigi la komercon, kostas, en la Korespondado : **5 centimojn** por ĉiu vorto ; en la Komercistaro : **10 centimojn** por ĉiu vorto.

Por la **grandaj reklamoj**, peti la specialan tarifon ĉe la Administracio.

FELIETONO

Prikongresaj impresoj de la neesperantista Gazetaro. —

Ĉiujare, okaze de ĉiu el niaj Internaciaj Kongresoj, la diversnaciaj jurnalaj forlasas la bedaŭrandan silenton, kiun tro ofte oni konstatas, kaj dum kelkaj semajnoj la nomo de D^o Zamenhof,

la vortoj Esperanto, Esperantistoj, Esperantismo, trakurante la gazetojn, sin trudas al atento de l'tutmonda publiko.

Kompreneble, en kelkaj artikoloj, ĉu severformaj, ĉu ŝercoplenaj, oni asertas denove, ke nia movado ne sukcesos, ke « lingvo

internacia » povos nek naskigi, nek vivadi. Ni ridetu kaj ne protestu. Eĉ atakante nin, oni helpas al nia propagando, ĉar oni nevole instigas la pripensemajn homojn kontroli tiajn opiniojn kaj esplori mem la demandon.

Malgraŭ ĉio, pligrandiĝas ĉiujare la nombro de la gazetoj, kiuj raportas pri nia Kongreso; ankaŭ plimultiĝas tiuj, kiuj sin montras favoraj.

Ni do, kiel la lastan jaron⁽¹⁾, trarigardu la ĵurnalajn elĉerpaĵojn ĝis nun ricevitaĵn :

Unua konstato estas, ke multnombro ĉiuspecajn artikolojn, komunikajojn, telegramojn, notetojn, oni presigis. Dua, ke kelkaj el ili, sufiĉe gravaj, devenas de lando ĝis nun preskaŭ indifera, t. e. Italujo.

Efektive, la « Unione », el Milano, l' « Avvenire d'Italia », « Il Resto del Carlino », el Bologna, kaj « Caffaro », el Ĝenova, favore raportis pri la Barcelona Kongreso. Ankaŭ « La Vita », el Romo, presigis telegramon. Tio ĉi estas kuragiga simptomo por niaj italaj kunbatalantoj.

Pri la kongreslanda gazetaro ni en la unua vico citu la Barcelonajn ĵurnalojn, « La Publicidad » (hispanlingva) kaj « La Veu de Catalunya » (katalunlingva), kiuj ĉiun tagon tre akurate, detale kaj ĝuste priskribis la diversajn fazojn de l' Kongreso. — Longan kaj favoran raporton publikigis « El Correo Español » (La Hispana Kuriero), el Madrid. Telegramojn pli-malpli detalajn oni legas en « El Imparcial », « La Epoca », « La Correspondencia de España », « Herald », « España

(1) Vid. la n^o 26 de *La Revuo* (Oktobro 1908).

Nueva », « El Siglo Futuro », ĉiuj el Madrido, kaj en « El Defensor » el Granada. Nur unu tute malfavoran artikolon ni trovis, tiun de Madrida « El Mundo » (12 de Septembro), kiu malĝentile juĝas nian kongreson ridinda, eĉ « iom groteska » kaj pretendas, ke « lingvo estas io neelpensebla, kio naskiĝas, disvolviĝas kaj kreskas kiel nia vivo mem ». Ni ja konas la argumenton, kaj tamen vivas kaj vivos Esperanto!

La Portugalaj ĵurnaloj « O Seculo » kaj « Diario de Noticias » el Lisabono, mallongajn sciigojn presigis, kaj la angla « Daily Mail » favoran raporteton publikigis.

En la franclingva « Journal de Genève » tre kolorplena, impresiga artikolo de nia amiko propagandisto Edm. Privat.

Fine, kiel antaŭe, multajn korespondajojn detalplenajn senditaĵn el Barcelono mem oni legas en la gazetoj parizaj : « Le Temps » (9-10-14 de Septembro) subskribite E. B. (ĉefliteroj de S^o Rektoro Boirac); « Journal des Débats » (9-14-15 de Septembro); « Comœdia » (31 de Aŭgusto kaj 14 de Septembro), tute bonajn artikolojn priteatrajn de nia amiko Chavet; « L'Eclair » (9-11-14 de Septembro) de R. de Lajarte; « La Croix » (10 de Septembro); « L'Illustration » (11 de Septembro) kun foto-grafajo de la unua kunsido.

Ankaŭ oni trovas en « Journal de Rouen » (7-9-10-11-13-14-15 de Septembro) aron da interesplenaj leteroj de *Spectator*; en « La Dépêche », el Lyon kaj « Lyon Républicain » (12 de Septembro), tri bonegajn raportojn; en « Le Salut Public » (2 de Sept.) el la sama urbo, intervjuon de D^o Zamenhof;

ATENTU!!!

Okaze de la **Granda Konkurso de Aviado** (200,000 fr. premioj), okazonta de la 14. ĝis la 30. Novembro 1909, kaj en kiu partoprenos la plej fame konataj Aerveturistoj en sensacia vetflugado super la Mediteraneo, — l' « Agentejo Iris », Privata Poŝto Restanta, 22, rue Mazagran, Marseille, sendos, post ricevo de internacia poŝtmandato de 5 frankoj, al ĉiulandaj Esperantistoj, eĉ ĉia adreso, **12 ilustritajn poŝtkartojn** kun fotografaĵoj de la aerveturiloj, surhavantajn la poŝtstampaĵon kun la dato, kiel memoraĵo de tiuj gravaj historiaj okazintaĵoj. L'Agentejo respondos per kelkaj vortoj *en Esperanto*.

Sin turni tuj al la « Agentejo Iris », sendante la adreson, plej legeble skribitan.

en « La Touraine Républicaine » (8-12-13-15 de Septembro) korespondaĵojn el Barcelono.

Telegramojn aŭ leterojn publikigis la jenaj francaj ĵurnaloj : « Petit Méridional » (Montpellier); « L'Yonne » kaj « L'Indépendant » (Auxerre); « Les Nouvelles » kaj « Journal du Soir » (Parizo); « Journal d'Amiens » (Amiens); « Havre-Eclair (Le Havre); « Journal de Maine-et-Loire » (Angers); « Bien Public » (Lyon); « La Dépêche » (Tours); « La Gironde » (Bordeaux); « Journal de Roubaix »; « République de l'Oise » (Beauvais); « L'Avenir de la Dordogne » (Périgueux); « La Dépêche » (Rouen); « Mémorial » (Amiens); « Le Courrier » (Saumur); « Le Républicain de l'Ouest » (Niort); « Le Républicain » (Bourges); « Le Progrès du Nord » (Lille); « La Loire » (St-Etienne); « Le Nouvelliste » (Strasbourg); « La Dépêche Tunisienne », « La Tunisie Française » kaj « Le Courrier de Tunisie » (Tunis), k. c.

Okaze de l'Kongreso aperis pri Esperanto je ĝenerala vidpunkto artikoloj : en « Le Radical » el Parizo (1 de Septembro, Paul Lecomte), tute favora; en « Les

Nouvelles », el Parizo (11 de Septembro). En « Le Siècle » (6 de Septembro, Paris) kaj « Le Progrès » (Dijon) malpli favore por nia lingvo konkludas S^o Jean Melia. Ankaŭ Deputato Gérard-Richard en « Paris-Journal » (9 de Septembro) nin moketas.

Sed la ĉefaj ĵurnalaj faktoj, kiuj povas nekalkuleble influi sur la publikon estas : Unue, la konvertiĝo de iu bonekonata verkisto, antaŭe tre malfavora al ni, S^o Jules Lermina, kiu, en « Le Radical » (16 de Septembro) konfesas sian eraron, dirante : « Esperanto pruvis sian viveblecon. Ni nun helpu ĝin kreski ! ». Due, la varma, entuziasma pledo farita de S^o Ernest Archdeacon en « Le Petit Parisien » (15 de Septembro), per kiu nia flamanta propagandisto faras alvokon al la bonfaranteco de S^o Carnegie kaj de aliaj miliarduloj ! Ni aldonu, ke lia konvinkoplena parolo jam efikis, ĉar ĵurnalo « Gil Blas », ĝis tiam tute malamika, intervjuiginte S^{on} Archdeacon fariĝis tute favora al ni.

Se la esperata varbado efektiviĝos, la materialaj malhelpoj malaperos kaj tiam la venko estos baldaŭa ! — R. DE L.